

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-ro 21, 27. Febr. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

La Komerca Ĉambro de Paris por Esperanto.

Considérant que les transactions du monde entier seraient grandement facilitées par l'emploi d'une langue auxiliaire internationale;

Considérant qu'il ne saurait nullement être question de porter atteinte aux langues nationales et, en particulier, à la langue française dont la littérature, intimement liée à notre histoire, est riche d'impérissables chefs-d'œuvre;

Considérant que la langue auxiliaire doit, au contraire, être insituée comme une sorte de Code international de langage servant d'interprète entre les nations, et doit pour cette raison pouvoir s'acquérir par une étude facile et rapide;

Considérant que l'esperanto paraît réunir les qualités désirables de clarté et de simplicité méthodique, tant au point de vue de la prononciation que de la grammaire, du vocabulaire et de la richesse d'expression,

La Chambre de Commerce de Paris

1. Décide d'introduire l'enseignement facultatif de l'esperanto dans ses Écoles commerciales;
2. Émet le vœu que cet enseignement soit généralisé en France et à l'étranger, et que les Chambres de Commerce de tous les pays soucieuses de faciliter les transactions commerciales favorisent la propagation rapide de la langue auxiliaire internationale.

Konsiderante, ke la interrilatoj de la tuta mondo estus tre faciligitaj per la uzado de helplingvo internacia;

Konsiderante, ke neniel povus esti demando pri malutilo al la naciaj lingvoj kaj, speciale, al la franca lingvo, kies literaturo, intime ligita al nia historio, estas riĉa je nepereblaj ĉefverkoj;

Konsiderante, ke la helplingvo devas, kontraŭe, esti enkondukata kvazaŭ Kodo internacia de lingvo, servanta kiel interpretisto inter la nacioj, kaj devas tial esti lernebla per studo facila kaj rapida;

Konsiderante, ke Esperanto ŝajnas reuniĝi la dezirindajn kvalitojn de klareco kaj de metoda simpleco, tiel koncerne la prononcadon kiel la gramatikon, la vortaron kaj la riĉecon je esprimoj,

La Komerca Ĉambro de Paris

1. Decidas, enkonduki la fakultativan instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj;
2. Esprimas la deziron, ke tiu ĉi instruado estu ĝeneraligata en Francujo kaj en la eksterlando, kaj ke la komercaj ĉambroj de ĉiuj landoj, zorgemaj plifaciligi la komercajn interrilatojn, favoru la rapidan disvastigadon de la internacia helplingvo.

La apuda rezolucio, pri kiu ni jam mallonge informis en nia antaŭa numero, estas unuanime alprenita en la kunsido de la Komerca Ĉambro de Parizo la 9-an de februaro 1921, laŭ raporto prezentita al la Komerca Ĉambro de s-ro André Baudet, en la nomo de la Komisiono por Komerca Instruado.

Interese estas sciigi pri la klopodoj kaj laboroj, kiuj antaŭiris la kunsidon de la Komerca Ĉambro kaj kiuj fine atingis tiel ĝojigan rezulton.

Amiko de nia jurnalo en Parizo havis la afablecon transsendi al ni la franclingve presitan tekston de l' raporto de la Komisiono por Komerca Instruado. Laŭ ĝi, ni povas doni jenajn detalojn.

La Komerca Ĉambro de Parizo, petite de la Grupo Esperantista de Parizo apogi la propagadon de Esperanto per instruado de tiu ĉi lingvo en la komercaj lernejoj, transdonis la aferon por esplorado al la Komisiono por Instruado.

La komisiono, tuj rekonante la utilecon de lingvo internacia, samtempe estis konvinkita, ke tiu lingvo ne povas esti la nacia, sed nur **helpa** lingvo; plue ke tiu lingvo devas esti klara, facila kaj riĉa je esprimoj por traduki ĉiujn nuancojn de l' homa penso.

Ĉu la lingvo Esperanto plenumas tiujn ĉi kondiĉojn? — Por esplori tiun demandon, la komisiono elektis sub-komisionon de kvin el siaj membroj por serioze studi la gramatikon. Ĝin la subkomisiono trovis sufiĉe simpla. Por informi

Niaj Amikoj en la Malproksima Oriento. ★ Internacia Estraro.

Tirola Pastro Katolika Bostcarolli faris Esperantan Diservon en Vladivostok.

Hungaraj Militkaptitoj Esperantistaj (poeto Baghy, kantisto Sarosi) kaj Aŭlanduloj vizitis la Societon.

(Sekvanta interesa raporto, stampita en Vladivostok la 26. dec. 1920, atingis nin nur la 20. febr.)

En Vladivostok la Societo „Espero“ en ĝia oktobra jarkunveno elektis sian novan gvidantaron: Prez. notario R. Vonago (polo), subprez. s-ro Enkur (estono), sek. s-ro Balog (hungaro), kas. s-ro Gurskij (ruso), bibliotekisto s-ro Vitoŝinskij (ukraĵiano), kaj por rezervitaj laboroj: s-ro Vladicaŝkij (ruso).

La societo estas fondita en 1897 kaj posedas altvaloran bibliotekon havantan pli ol 2000 diversajn verkojn. Kunveno de gvidanta komitato okazas ĉiun unuan dimanĉon en ĉiu monato.

Konstantaj, publikaj, tre sukcesplenaj kursoj estas gvidataj de s-ro Averkieff en la rusa klubo de Y. M. C. A.

Unua internacilingva publika diservo en Vladivostok okazis la 21-an de novembro ĉe oficejo de „Espero“. Prezidanto prelegis popularan, rusalingvan skizon pri signifo, historio kaj nuntempa stato de nia problemo. Sekretario Balog deklamis kun kortuŝanta efiko poemon de l' Majstro „Preĝo sub la Verda Standardo“. Poste pastro romkatolika, militkaptito s-ro Bostcarolli el Tirol, preĝis kaj temis pri la nuna krizo de evangelioj de homarano, pri tiuj de Jesuo Kristo. En la feston fermanta parolado sekretario diris interalie, ke vole-nevole la internaciaj komerc-teĥnikaj kaj oficialaj-administraciaj interrilatoj bezonas nian plej facilan internacian lingvoteknikan komunan ilon kaj servadojn de ties geadopintoj, kaj baldaŭ ni devas ekaŭdi pri la oficiala alproksimiĝo kaj kompostoma alprenado flanke de la gvidantaj registaroj.

La societo ludis gravan rolon dum la tuta mondmilita tempo kiel ĉirilata centra helpilo por la diversnaciaj esperantistaj militkaptitoj en Siberio kaj en ties notindaj sukcesoj en la tendaroj kaj urboj. Hungara Esp. poeto Baghy, hungara Esp. komponisto-kantisto Sarosi, eminentaj propagandistoj s-ro Taubmann, Engelmann, Szili kaj mult-

ege da aliaj iliaj kameradoj estos neniam forgesataj ĉe ni.

Multe da eksterlandaj samideanoj vizitis nian rondon, el Japanujo s-roj militŝip-oficiro Oba, registar-oficisto Fujisaua (delegito al la Haga kongreso), inĝen. Takahaŝi, prof. Nakanome; el San-Francisco s-ro Zelinsky; el Kanado s-ro Boys, el Ruslando multe da Esp. eminentuloj.

* * *

Ĉi-sekvante ni publikigas kelkajn el la bukedo da poeziaj floroj de nia hungara samideano Julio Baghy, kiujn donacis al li la Muzo en la soleĝo de siberia militkaptiteco. Unu (Fabelo) estas komponita de s-ro A. Gurilev, aliajn (Barkarolo kaj Arbara Idilio) komponis s-ro M. Sarosi.

FABELO.

Plenan lunon sur ĉielo miras eta prinĉidin' kaj ekĝemas amospire; Pala lun', mi amas vin!

Plena luno sur ĉielo briletante movas sin kaj refluŝtras la respondon: Ankaŭ mi Vin, prinĉidin'!

Dum silenta rava nokto per eterna jura vor' pala lun' kaj prinĉidino ligas sin al sama sor'.

Jen de tiu sorĉa nokto en sufero dolĉa flam' brulas en la etaj koroj pro turmenta vana am'.

Malespere plorgemante kun sopiro en anim' konsumiĝis pro doloro plena lun' kaj prinĉidin' . . .

BARKAROLO.

Dormu dolĉe, kara,
en boato,
vi amata,
sur la akvo mara
dormu dolĉe vi,
dormu dolĉe vi . . .

Brilas eta stelo;
ĝi rigardas
kaj nin gardas
supre sur ĉielo,
dum vin varias mi,
dum vin varias mi . . .

Dormu vi, dormu vi dolĉe,
lulas vin noktosenl';
revajojn fluŝtras nun al vi
varme la mara veni'.
Dormu vi, dormu vi dolĉe,
kaj se vekigos vi,
kun mil da kisoj salutas
sanguroĝa buŝ' de mi!

* * *

ARBARA IDILIO.

Purpuraj rebriloj de suno somera
orumas arbaron en luno vespera,
koboldo petola kun eta feino
kanteton kantadas pri l' amo sub pino.

Koboldo kantetas . . . felno atentas.
Pri l' amo kantante li amon eksentas,
ŝin firas al si kaj kor' ĉe kor' tenante
instruas pri l' amo ŝin arde kisante.

Je kiam alvenas matena krepusko
jam rezas silento sur lito de musko,
Kun dolĉa ruĝbrilo dormetas feino
kaj ruze ridetas koboldo sub pino . . .

Pasintan semajnon alvenis la okcidenta abonanto al ET. Nun la nombro de la pagantaj abonantoj estas 820. Supren

el la naŭcentaj!

sin pri la historio, disvastiĝo kaj prononcado (pri kies egaleco en la diversaj landoj ĝi iom dubis), la subkomisiono intertraktis kun s-ro Rollet de l'Isle, prezidanto de la Grupo Esperantista de Parizo. Ĝi estis konvinkata precipe per la fakto, ke 1911, en la kongreso de Antverpeno, ĉ. 1800 esperantistoj (en la raporto estas erare presite 800) apartenantaĵ: al 42 diversaj nacioj bonege interkomprenis kaj ke estis tute neeble, laŭ la prononcado ekkoni la nacieron de la parolantoj.

Restis ankoraŭ esplori, ĉu Esperanto taŭgas por esprimi ĉiujn nuancojn de l' homa penso.

La subkomisiono, ne volante facilanime pri-trakti tiel delikatan problemon, rezonis: la franca lingvo estas la plej riĉa kaj plej preciza el ĉiuj naciaj lingvoj. Se do franca teksto tradukita en Esperanton kaj retradukita en francan ne estos deformita, oni rajtas diri, ke la helpa lingvo havas realan valoron koncerne tion.

La eksperimento estis realigata ĉe la Komerca Ĉambro la 30. dec. 1920.

Tri tekstoj estis elektataj de la subkomisiono je tiel preciza stilo, ke eĉ plej malgranda modifo povis tute deformi la sencen. Ili estis tradukataj en Esperanton antaŭ la komisiono per du esperantistoj. Poste tiuj ĉi estis forlasataj kaj anstataŭataj per du aliaj, komisiataj retraduki la esperantigitajn tekstojn en francan lingvon.

La tekstoj tiamaniere referataj, kvankam ili ne ripetis ekzakte vorton post vorto de la originaloj, tamen reproduktis la sencen precizan je tia maniero, ke la duobla iraduko estis ĵugata kiel neniel alia laŭ la senceno de la tekstoj donitaj por pruvo.

Do la raportanto de la subkomisiono rajtis konfirmi antaŭ la Komisiono per Instruado, ke „tiam ke ĝi (la subkomisiono) povis juĝi laŭ siaj laboroj kaj eksperimentoj, Esperanto posedas la kvalifiton de precizeco samtempe kun tiuj de klareco kaj facileco, kiuj devas esti postulataj de helpa lingvo internacia“.

Havante en manoj tiajn rezultatojn, la Komisiono por Instruado kredis, ke „la Komerca Ĉambro de Parizo, fidelaj al siaj tradicioj de sindonemo al progreso, devas respondi al la alvoko farita al ĝia influo por evoluigi instrumenton de internacia intersanĝado tiel valoran kiel povas esti universale per interkonsento disvastigita lingvo“.

Plue la raporto parolas pri la Esp. kongreso, pri la halfigo de la Esp. movado per la milito, pri la fervoro, je kiu nun la „nations de proie aujourd'hui victorieusement domptées“ propagandas Esperanton, antaŭvidante ĝian estontan utiligon por la komerco. (Foiroj de Frankfurt kaj Leipzig!)

Parolante pri *Ido*, la raporto akcentas, ke ĉi tiu ĉi instrumento povas esti absolute perfekta, ke la skismo nur prokrastis la evoluadon de Esperanto, kaŭzante konfuzon inter la publiko, kaj „ke — por certigi la uzadon — oni devas komenci la instruadon de la lingvo tia kia ĝi estas“.

Fine, la raporto mencias la vigilan propagadon por Esperanto en kelkaj landoj, precipe ankau en Japanujo. „En Azio“, ĝi diras, „tiu ĉi aspiro (je internacia lingvo) egalvaloras la necesecan asimili al si la civilizojn europajn, ne lasante sin regadi per tiu nacio, kies lingvo fariĝus super-regenta“.

Konklude, la Komisiono por Instruado, surprizita per la tutaro de tiuj ĉi faktoj, kredis, ke la Komerca Ĉambro de Parizo ne rajtas malatenti movadon, kiu povas alporti al la internacaj interrilatoj, precipe sur la kampo de l' komerco, tre valoran helpon, kaj ke la Ĉambro devas eldiri

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Koroŝenko.

Tradukis laŭ la 8-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro

Maria Sidiŝovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

(16-a daŭrigo.)

„Mi rimarkas, Mr. Bork“, sin turnis al li Mateo, „ke viaj infanoj ne tre ŝatas la festojn?“

La hebreo medite karesis sian barbon kaj diris:

„Ha, ĉu vi deziras scii, kion mi al vi diros? Ameriko estas tia lando, tia lando! Ĝi muelas la homojn, kiel bona muŝleo.“

„Kredeble, ankau ĉi tie via religio ne estas tre ŝata?“

„Ne, vi tute ne estas prava. Se vi deziras, mi montrós al vi nian ĉi tiean sinagogon. Vi vidós, kian belan sinagogon ni havas! Kaj ni rabeno estas respektata, kiel ĉiu ĉi tiea pastro. Kiam foje li estis invitita antaŭ la ĵuĝistaro, li sidis kun ilia ĉefepiskopo, kaj ili interparoladis — kiel kuzoj.“

„Ĉu vi tamen forlasas vian religion?“ diris la Loziŝtano. „Sajnis al li nekredinde, ke eĉ ĉi tie oni povas egaligi rabenon kun pastro.“

„He, ne facile estas komprenigi al vi tion! Aŭskultu! Ameriko estas hipokrata lando, ĝi tuŝas nenies religion, Dio gardu! Ĝi proprietas al si la tutan homon. Sed kiam homo aliĝas, ankau lia religio fariĝas alia. Ĉu vi ne komprenas? Nu, mi klarigas al vi alimaniere. Kiam mia filino finis kurson en lernejo, miaj aferoj komencis iri malbone. Nu, oni diras al mi: „Via filino ja povas labori en fabriko. Oni pagas dek dolarojn semajne, kaj kiam ŝi bone elernas la laboron, oni alpagos du dolarojn semajne.“ — Kion vi pensas pri tio? Ĝi ja faras dudek kvar rublojn semajne, — ĉu ne bona mono?“

rezolucioj sufiĉe eflikan, por ke Esperanto penetru en la komercajn lernejojn.

Al la kontraŭdoro, ke malutilis al la lernejoj, kies programoj estas jam tro ŝarĝitaj, la instruado de lingvo, kiu ja devas fariĝi universalas, sed kies uzado ankoraŭ estas limigita dum nombro da jaroj, la komisiono respondas unue, ke tiuj popoloj kaj tiuj homoj, kiuj la unuaj utiligas la novajn procedojn, ankau la unuaj rikoltos la profitojn.

Kaj due, la komisiono diras, ke la instruado estu fekultativa, kaj ke la direktoroj de la lernejoj jam sciós kiom da tempo disponigi por la instruado de Esperanto.

Cetere, la instruado de Esperanto havas grandan pedagogian valoron eĉ por la studo de la franca lingvo. Por tiuj lernantoj, kiuj ne lernis latinan lingvon, Esperanto povas eĉ ludi la rolon de tiu ĉi klasika lingvo.

Komprenable, oni devas venki certajn antaŭjuĝojn. Multaj homoj ja pretendas, ke estas pli bone atendi, ĝis aliaj komencos. Jen la sama, kion oni diris pri la telefono kaj pri ĉiuj novaj eltrovaĵoj.

Sed „ni ne forgesu, ke nia rolo ne konsistas sole en tio, enregistri la progreson por adaptigi nin al ĝi; nia devo estas precipe kreskigi ĝin kaj ĝin propagandi tra la mondo“.

Aludante ankoraŭ la kreon de Internacia Komerca Ĉambro, la raporto finfine enhavas la tekston de la rezolucio alprenota kaj unuanime alprenita de la Komerca Ĉambro en la mendita kunsido.

Al tiu ĉi raporto ni bezonas nenion aldoni. Ĝi parolas por si mem. Pli brilan, pli konvinkan pledadon por nia afero ni eĉ ne povas deziri.

Al tiuj inter ni esperantistoj, kiuj — kvankam malriĉaj kaj eble en mizera situacio — tamen ne perdas la kuragon kaj volonte oferas ĉion ajn, tempon, monon kaj forton, por nia kulturaliga ideo, ni precipe montras tiun frazon de la raporto, laŭ kiu „tiuj popoloj kaj tiuj homoj, kiuj la unuaj utiligas la novajn procedojn, ankau la unuaj rikoltos la profitojn“.

Ni ne scias, kiel longe daŭros ankoraŭ la tempo de propagando por Esperanto; sed tio estas certa, iam nia ideo trapanetos — eble eĉ pli frue ol ni supozas. Tiam ni pioniroj de Esperanto sendube estos riĉege rekompencataj, ne sole ideale sed ankau materiale.

Estu do la rezolucio de la Komerca Ĉambro de Parizo por ni nova kuragigilo, persistadu en nia malfacila tasko almiŝti la mondo! Obstine al la celo!

Esperanto-Tago en Malmö.

La 10-an de aprilo la Esp. Klubo en Malmö festos sian 15-jaran jubileon kaj aranĝos samtempe Esperantan Kongreseton, precipe por sud-svedaj s-anoj. Sed ankau aliaj s-anoj estas kore invitataj. La aranga komitato invitas speciale ĉiujn danajn samcelanojn, ĉe kiuj oni antaŭe ne longe havis amikan kuneŝton. Oni bonvole sin anconu antaŭ la 1-a de aprilo. Adreso: s-ro Erik Andersson, Rörslögatan 16, Malmö (Svedio).

La Printempa Kongreso de Revelo

okazos la 10-an de Aprilo en Köln. Ankau aliaj germanaj kaj eksterlandaj samideanoj estas kore invitataj. Adreso: Köln, Hohestr. 26 (A. Junker).

„Bonega mono!“ jesis Mateo. „Tiam da mono eĉ ni oni pagas al-laboristo de l' unua de oktobro ĝis Pasko. Certe, inkluzive nutraĵoj.“

„Jen! Ŝi iras al Mr. Berkley¹⁶⁾, kiu havas propran fabrikon. Mr. Berkley diris: „Bone! Hebreoj laboras ne malpli bone ol aliaj. Mi volonte dungos la hebreojn. Sed mi ne povas permesi, ke mia stablo estu neokupata sabate. Estu por mi malprofito. Vi devos veni labori ankau sabate.“

„Nu?“

„Mi respondis: „Pretere mi mortus aŭ mi estus vendanta alumetojn en la stratoj, ol permesi al mia filino rompi la sanktan sabaton.“ Bone! En la sama tempo alvenis ĉi tien Mr. Mozes. Vi certe ne scias, kiu estas Mr. Mozes? Li estas hebreo el Louisville¹⁷⁾. Li havas saĝon kiel fajron, kaj-langan kiel martelon. Li transforĝis¹⁸⁾ ĉiujn siajn hebreojn en Louisville, poste vizitis aliajn urbojn. Ni kunvenis en la sinagogo por aŭskulti tiun Mozes. Li diras: „Mi aŭdis, ke multaj el vi suferas kaj mortas, ne volante rompi sabaton.“ Ni respondas: „Jes, vi aŭdis la veron. Sabato ja estas sankta! Sabato estas reĝino, luno de Israel!“ Li diras: „Vi similas homon vojaĝantan, kiu sidigis sur sian azenon la dorson antaŭen kaj tiras ĝian voston. Vi ne rigardas antaŭen, sed malantaŭen, tial vi ĉiuj enfalos en kavon. Sed se vi nur sciós bone rigardi malantaŭen, vi ankau povus diveni la elektitan vojon. Ĉar kiam en la epoko de Makabeoj idolistoj mortigadis la Izraelidojn, viaj praavoj mortadis kiel ŝafoj, ĉar ili ne uzadis siajn glavajn sabate. Nu, kion Dio tiam diris? Dio diris: „Se tio daŭros, ĉiuj miaj idoj por sabato estos ekstermitaj“

¹⁶⁾ Anzela familio, el-parolu „Berkli“.

¹⁷⁾ El-parolu „Louisvill“.

¹⁸⁾ Metajoro: aliformis, referis.

PETIT PARISIEN, 15. febr. La plei disvastigita ĵurnalo de la tuta mondo, raportis pri la enkonduko de Esperanto en la komercaj lernejoj de Paris laŭ la decido de la Komerca Ĉambro. PORTUGAL COMMERCIAL E INDUSTRIAL, nov.-dec. 1920. Bela ilustrita revuo kun interesa teksto en portugala lingvo kaj kun ĉ. 60 anoncaj paĝoj. La numero enhavas ankau 4-paĝan Esperantan Fakon redaktitan de nia samideano Saldanha Carreira, kun la ĝojiga komuniko, ke la komitato (45 membra) de la foiro de Lisboa unuanime elektis Esperanton kiel duan oficialan lingvon de la foiro krom la portugala. La revuo estas abonebla je 36 fik. por unu jaro (provnumero senpaga) ĉe la administracio: Rua do Carmo, 90-2, Lisboa.

BOITE für Stadt und Land, kaj RHEINBERGER ZEITUNG, du gazetoj apartantaj en Xanten (Rejnlando), de 5. kaj 12. febr., enhavas Esp. angulojn.

Ni ricevis eltrancaĵon el iu kajero de la revuo BERGSTADT, kun bonega, detala, 16-kolona artikolo de s-ano M. Mieliert en Breslau pri „Esperanto en Hago“.

LE SYNDICALISTE DES P. T. T. 17. febr. Grandformata ĵurnalo, enhavas artikolon pri la „Universala Poŝta Unio kaj la Lingvo Esperanto“ verkita de s-ano S. Frantz en Paris. La ĵurnalo anoncas, ke ĝi publikigos kurson de Esperanto.

NOWE TORY kaj VOLKSZEITUNG, du gazetoj apartantaj en Bromberg-Bydgoszcz (Polio), tre favoras nian lingvon kaj raportas pri nia movado en ĉiu numero.

REVISTA SOCIAL. N-ro 147—48. Rio de Janeiro. Organo de Unio Katolika Brazilia. Enhavas ilustritan artikolon „La Eklezio Katolika kaj l' Esperanto“, kun teksto parte el ET.

MULTES JÓVÓ (hebrea gazeto) de 4. febr., aperanta en Budapeŝt, recenzis la duan „Leteron el Palestino“ aperinta en ET n-ro 14.

Societa Vivo.

BUDAPEST. En la landa societo konstante kunvenas tridek—kvardek personoj. Preskaŭ ĉiam estas laŭlegado, deklamado kaj kantado. La naŭa distrikta laborista grupo aranĝos la 2-an de marto kabaredon kun tute Esperanta programo. Bedaŭrinde la diversaj grupoj estas tre malproksimaj unu de la alia kaj la interkomunikiloj malbonaj kaj karaj.

La laboristoj forte laboras. Novajn kursojn ili anoncas en la fakorganizejoj de la bakistoj, de la tajloroj, de la fer-kaj metallaboristoj, de la komercaj komizoj, de la fervojistoj, de la ligno-laboristoj, kaj en la naŭa distrikta kaj en la kispeŝta laboristhejmoj! „Se nur ĉiuj kursoj ĝis fino sukcesus!“

Bedaŭrinde multaj bonaj esperantistoj forlasis Hungaron por serĉi alilande feliĉon! Al la postkongreso jam kelkaj alilandanoj anoncis sin. Oni devus ĝin aranĝi tiel, ke la partononitoj povu laŭvole portropeni la grazan katolikan kaj la italan turistan kongreson! Do ili ne okazu samtempe! El Praha oni povus iri al Budapeŝt kaj de tie tra Graz al Italujo!

UEA

estas nia plej grava kaj plej praktika organizajo; ĉiu celkonscia samideano devas esti ĝia membro!

kiel brutaro, tiam kiu gloros la sabaton? Pli bone estos, ke ili uzadu la glavajn sabate, kaj ke restu en vivo miaj idoj.“ Nun pripensu do: se estis permesate uzi glavon por mortigi la malamikojn, kial vi ne povas uzi stablon, por ne pereci per malsato en fremdlando? — Ha! Ĉu ne prave mi diris al vi, ke Mozes estas saĝega viro?“

Mateo rigardis la hebreon, kies okuloj strange brilis kaj diris:

„Sajnas al mi, ankau vin tio allogas ... Mi opinias vin homo respektinda.“

„Ni, maljunuloj“, respondis Bork kun ekspiro, ankoraŭ ne cedas, sed la junularo ... He! Ĉu pensvaloras paroli pri tio? Tiam mia filino venis al mi kaj diris: „Kia ajn estas via volo, patro, ni ne devas pereci. Mi laboros en la fabriko sabate. Nia sabata festo ja povas esti prokrastita ĝis dimanĉo!“

Bork prenis sian barbon ambaŭmane, algravidis Mateon per longa rigardo kaj diris plue:

„Vi ankoraŭ ne scias, kia lando estas Ameriko! Jen, konsideru mem, ĉu ĝi plaĉos al vi? Mr. Mozes en sia sinagogo edzinigas hebreojn je kristanoj kaj male.“ „Aŭskultu, Berko“, diris Mateo iom koleterete. „Sajne, vi jam ŝercas?“

Sed Bork rigardadis lin tute serioze kaj per liaj okuloj Mateo komprenis, ke li ne ŝercas.

„Jes“, li diris kun ekspiro. „Vi mem vidós. Vi estas ankoraŭ viro juna“, li aldiris enigme ... „Niaj junaj viroj ĉiuj jam estas reformistoj aŭ — ankoraŭ pli malbone — epikuranoj ... John! Venu ĉi tien por momento!“ li vokis la filon.

La ridado kaj interbabilado en la apuda ĉambro ĉests, kaj la Juna John venis, ludante per sia horloĝoceno. Roza scivole rigardis el la pordo.

(Daŭrigeta)

Scienco.

NOVA KOMPreno DE LA VIVO KAJ GIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO. (Fino.)

Bonvolu legi en numero 19:
Tria paĝo, dua kolono, linio 11 de supre: „elastecon-
energio“ anstataŭ „elastecon“. — Al tio noto: Elastecon
estas nur eco de materialo, kiu kapablas la materialon
efiki kiel akumulatoro de mekanika energio. Elastecon-
energio estas energio egalvalora al varmo kaj elekto,
la stato de la streĉita risorto.
Linioj 26 kaj 45 de supre: „mili-wal-sekundoj“ anstataŭ
„miliamperoj“.

Falsan konkludon, kion oni povas firi el la
dirita, mi devas ankoraŭ antaŭveni. Ŝciu oni
povas kredi, ke estas bone laŭ tio manĝi multe
da salo. Sed tio ne estas ĝusta, ĉar ankaŭ tie
ĉi valoras la principo: „Multe ne helpas multe“,
ĉi tie regas la leĝo de la plej bona maldensigo
ĝis certa grado. Relativa perfekteco de la disocio
kaj samemaniera la konduka kapablo de la solvojo
kaj de ionrapideco kreskas kun la maldensigo.
Se ni havas plenvolarajn, nutradsalticajn fruktojn
kaj kreskajn, tiam ni tute ne bezonas saladonon.
Bedaŭrinde nia agrikulturo ne scipovas jam kom-
plete al la tero anstataŭigi la perditajn salojn,
precipe la natron, kaj tial oni devas aldoni iom
da kuirsalto.

Valora estas la elektrolit-teorio de Hirth por
la kritiko de ŝvitproceduroj, ĉar per la ŝvito estas
eligataj 0,6% da saloj. Nature povas ekesti en
la korpo per troa ŝvitado ekelektrolit-malriĉo,
tio okazas ĉe la pervarmegfrapo kaj ĉe la abunda
ŝvito de fizuloj. Por atingi tion nedeziritan eikon,
tute kolosaj ŝvitproceduroj estas necesaj. Kaj tie
ĉi mi ne konsentas kun Hirth, kiu sekve de sia
propria teorio kaj de nesufiĉa praktika sperto
fariĝis tiel timema, ke li entute ne tre ŝatas ŝvitadon.
La kuracista empirio montris, ke ŝvitproceduroj
estas unus el la valoraj helpiloj tiel por la sana
kiel ankaŭ por la malsana homo. Generale mal-
plifortaj ŝvitproceduroj sufiĉas, kiujn oni preferas
pli ofte ripeti. Sed ekzistas ankaŭ multe da kazoj
en la kuracista praktiko, kie oni senkondiĉe devas
uzi fortajn ŝvitprocedurojn, por atingi sian celon
terapian. Evidente la korpo havas la kapablon
ree anstataŭigi rapide el la nutraĵo la perditajn
elektrolitojn.

Ankaŭ sur la signifon de varmo por la korpo
falas nova lumo. La pli bona travarmigo de la
korpo sekvigas, ke ĉiuj elektraĵoj kaj ĉiuj procesoj
en la korpo pli bone funkcias kaj ĉar albumino,
karbonhidratoj kaj grasoj essence nur estas varmo-
liverantoj, ili povas esti anstataŭigataj ĝis certa
grado per varmokulturo de ekstere. Do la varmo
estas egalvalora al la nutraĵo, kaj laŭ mia sperto,
la nutraĵo povas esti anstataŭigata per varmo ĝis
triono, kio nun ĉe la gras-kaj nutraroj manko estas
plej signifna. Mi vidas ĝuste nun en ĉi tiu tempo
de granda mizero, ke mia varmokulturo festas la
plej belajn triumfojn! Unu horo de varmaga sur-
ventra botelo aŭ de la elektra kompreso estas tiel
bonaj kiel dek gramoj da butero. Hodiaŭ kiam
ĉiuj frostas sekve de grasmanco, oni povas krei
helpon nur per varmokulturo. Nia korpo bezonas
nur malgrandan grasokvanton, ĉar ĝi povas formi
la grason por la remburado bezonata, ankaŭ el
karbonhidratoj, kaj en tio ĝi sukcesas des pli
bone, ju pli ĝi estas travarmigita. Do tiel la varm-
kulturo helpas plej bonmaniere substiui la nun
ne sufiĉe provizeblan grason.

Ankaŭ niaj ideoj pri imuneco estas fruktigitaj
per la Hirth-a teorio. Evidente tiu korpo estas
aparte imuna, kiu abunde disponas pri elektra
forto. La elektra ŝargita ĉelo povas paralizati per
sua elektra forto senpere la minacantajn bakteriojn;
jen proceso konforma po malgrande al tio, kion
ni pogrande observas ĉe gimnotoj kaj aliaj elektra
fiŝoj, uzantaj ilian elektran organon kontraŭ la
malamikoj.

Tiel do, la elektrolit-teorio ŝatas tute novan
lumon sur la plej diversajn vivaperojn, kaj certe
estas destinata montri tute novajn vojojn kaj akceli
la medicinon al ĉiu direkto.

Fine mi atentigas la bonan nutradan salon de
Hirth eltrovitan, al kiu li donis la nomon „Elek-
trolit“ aŭ „elektra trinkaĵo“, pri kiu mi vidis multe
da bonaj sukcesoj.

Ankoraŭ unu mallonga parolo finja:

Ni sukcesis iom pli levi la vualon de la sekreto
kuŝanta sur nia vivo, sed mi opinias: oni tamen
ne povas klarigi la vivon naturscience, t. e. materie.
Malantaŭ la materia flanko de la vivo estas
ankoraŭ io sekreta transcenda, kion nia intelekto,
nia racio ne komprenas. Intelekto kaj racio estas
surfacaĵ fortoj, kiel Schopenhauer tute ĝuste
rimarkis. En la misteran profundon, en la esencon
de la aĵoj ili ne penetras. Ni ne scias, kio estas
substanco kaj forto laŭ ilia esenco kaj same ni
ne povas klarigi materie la psikan, interligitan plej
intime kun ĉiu vivo. Ĉiuj niaj klarigoj estas nenio
alia ol pli bonaj priskriboj. Do tiel la vera scienco
same kiel la religio lastafunde kondukas en la
regionon de la mistiko. D-ro W. WINSCH.

PRI PRAHA

la urbo de la Dektria, ni publikigos en nia venonta
numero rice ilustritan artikolon. Samideanoj
dezirantaj pliajn ekzemplerojn de tiu numero, bv.
skribu al mi. Por po 2 ekzemplerojn de la numero
pri Praha ni forprenos de via konto unus el la
de vi abonitaj numeroj tiamaniere, ke via abono
sinigas unu numeron pli frue.

Tra la Mondo.

La Londona Konferenco estis malformata
la 21. febr. per kunsido de la Supra Konsilant-
aro.

La Plebiscito en Supra Silezio estas okazonta
— laŭ decido de la Londona Konferenco —
je la 20. marto aŭ je najbara dato.

Cefministro Briand kaj pola ministro por
eksteraj aferoj princp Sapiha subisignis je
la 19. febr. politikan konvencion, kiu interalie
temas pri defensiv-ligo inter Francio kaj Polio.
La rezultato de la elektioj por la prusia par-
lamento estis ĝis 25. febr. jena: socialistoj
115 sidoj, centro (katolika partio) 90, german-
naciistoj 75, germ-popol-partio (liberala) 57,
komunistoj 30, sendependaj socialistoj 28, demo-
krajtoj 26 kaj ekonomia partio 4; entute 421.
Letero de fraŭlino el New York al esperantisto
en Nederlando parolas pri t. n. „drive“ por la
„Hooverfonds“. S-ro Herbert Hoover, antaŭ
nelonge reveninte el Eŭropo, komencis kom-
panion por „the salvation of 5 million starving
children in Central Europe“ (savado de 5 milio-
noj da malsatintoj infanoj en Centra Eŭropo).
Li diris, ke li devas kolekti minimume 10 dol-
arojn por ĉiu infano. — La „Association of the
Moving Picture Industry“ devigis sin al
s-ro Hoover por zorgi kontribuon de 10 mili-
onoj da dolaroj, kaj ĉiuj teatroj en Usono cedis
la tutan espezon de 29. jan. por la „Hoover-
drive“.

Eble la plej mal multe vizitata insulo en la mondo,
kiu havas enloĝantojn el Eŭropo, estas la insulo
Tristan da Cunha. La insulo troviĝas en la
Sud-Atlantiko (58° S., 12° Oke.). Kelkfoje,
iaraĵ trapasas, antaŭ ol ŝipo faras viziton al ĝi.
En la jaro 1916 la loĝantoj unue alidis pri la
komenco de la mondmilito. La loĝantoj fervore
laboras; tamen ili ofte ne posedas sufiĉe da
necesajoj. Ekzemple, kiam ŝipo vizitis la insulon
en 1916, la ŝipanoj trovis, ke la enloĝantoj
estis vestitaj en feloj; ĉar la vestoj, kiujn ili
ricevis en la pasinteco, jam estis eluzitaj. —
Angla samiteano sendis al la insulanoj kelkajn
Esperanto-ŝlosilojn; ĉar eble dum la mal-
lumaj vesperoj troviĝis inter ili kelkaj, kiuj
ŝatus studi nian lingvon.

Dum skiado en la regiono de l' Dachstein-monto
sep personoj estis surprizataj per la vango
kaj mortigataj.

Internacia Esperanto-Servo.

(La traduko kaj la represo en naciaj ĵurnaloj kun aldono
de la vortoj „Internacia Esperanto-Servo“ estas permesata.)

UNUA MONATA LETERO EL ITALIO.

Bologna, febr. 1921.

Estas esperinde, ke hodiaŭ en fremdlando
oni ne plu aŭskultu pri Itala interna politika vivo
tiujn neverajajojn, kiujn ja gazetaro kutimis,
jarojn ĵus pasintajn, listigi antaŭ la okulojn de
l' mondo.

Sendube la du jaroj, kiuj pasis post la milit-
fino, estis por nia lando (kaj por kiu alia ne?)
plenaj je skuoj, akra politika konflikto, eĉ danĝeroj
pli malpli gravaj. Sed hodiaŭ ni povas feliĉe
diri, ke la plej malfacila periodo jam transpasis.
La politika konflikto estas nun ree sur la grundo
de la laŭleĝeco kaj sin volvas interne de l' kon-
cepto de supereco de la ŝtato. Merito je tio estas
grandparte de l' saĝe ekvidanta karaktero de
nuna ĉefministro s-ro Giolitti, kies politika figuro
ĉiam pli kreskas ĝis videbliĝi kiel vera kaj en
nia lando eble sola hodiaŭa ŝtato (statesman).
Anstataŭ stariĝadaj la registaron kiel organon de
unu partio aŭ, malpli bone, de unu socia klaso,
iom post iom li sukcesis firmigi la pozicion de
l' Registaro kiel supera kontrolanto kaj gvidanto
de ideo politika konflikto, kiu regule okazadas
inter la enlandaj partioj, kaj parte interpretanto
de l' fina resuma rezulto, kiu estas la tiel dirita
„publika opinio“, la sola vera reganto de la
liberala ŝtato.

Nuntempe tri gravaj problemoj urĝas en la
interna politika polemiko: prezo de pano, laborista
kontrollo en la industrioj, ŝtata libera ekzameno.

La unua leĝoprojekto estas nun aprobata de
l' Parlamento post longa kontraŭstaro de la social-
istaj deputatoj. Ĝi portas la „politikan prezon“
de pano de liroj it. 1,20 al 2,50 po kilogramo.
Ĝis nun la politika prezo kostis al la ŝtato, kiu
estas devigata venigi la triikton el fremdaj landoj,
kelke da milionoj po monato.

La leĝoprojekto pri kontrollo en la industrioj
estis bazo de l' akordoj inter laboristoj kaj mastroj
post la ĝenerala striko de metallaboro dum pasinta
somero. Tiu ĉi projekto, nun prezentata al la
Parlamento, signas la unuajn liniojn de rekonstru-
ado de la rilatoj inter produktantaj klasoj (labor-
dantoj kaj farantoj), kiu estas neceso de l'
nuntempa laciĝa ekonomia momento, plenaj ĉi
problemoj. Plue, per tiu ĉi agado la ŝtato ree
montras sian kapablon aktive eniri la socian
evoluanon, kiel interpretanto de iaj araj demandoj.
Nun la klasoj kaj la partioj estas vokataj eks-
perimenti sian politikan konscion, sur tiu ĉi grundo
prezentaĵo de l' Registaro.

Al analogia eksperimento vokas la tria leĝo-
projekto, kiu nun vekas aron da diskutoj ĉiuloke
en nia lando. La ebleco de rekonstruo nacia estas
ligata sendube al tiu de l' ara instruado. La pro-
blemo komplikiĝas per etikaj kaj ideaj valoroj. La
porinerva ministro senatano B. Croce, monda-

konata filozofo (novhegelano), proponas enkon-
dukon de libera „ŝtata ekzameno“ flanke de la ĝis-
nunaj ŝtaternejoj. Tio estos gravega helpilo al
la privata instruado, sed — politikaj riprenoj
sufforas, ke la plej gravan helpon ricevos la „kleri-
kaliaj“ lernejoj. (Preskaŭ oni ripetatas, maldirekten,
la konflikton hispanan pri libera lernaĵo de poziti-
vistoj k. c.)

La Parlamento estas do vokata pravi sian
veran kapablon tutan, kaj oni diras en la duon-
oficialaj rondoj de Roma, ke la Registaro eĉ estas
ema rekonvoki la ĝeneralaĵn balotoadojn, se la
deputitaro ne sentos la urĝecon de la problemoj
kaj la seriozecon de l' historia momento.

UMBERTO TOSCHI.

LETERO EL POLIO.

Bydgoszcz (Bromberg), febr. 1921.

Dum la lastaj tagoj de januaro oni solenis en
Polio kaj precipe en Grand-Polio grandan feston:
ĵus trapasis unu jaro, depost kiam la germana
soldataro kaj parte ankaŭ la oficiistaro estis devig-
ataj forlasi la germanajn regionojn, kiuj per la
pactraktato estis aljuĝitaj Polion. Kaj tuj alvenis
la polaj militistoj kaj okupis la tutan teritorion.
Forpasis nun unu jaro de ĉi tiu okazo. La unua
datreveno sub pola regado! Jen la kaŭzo de la
solenita festo! La iam en ĉi tiuj regionoj flirtantan
prusan flagon anstataŭas nun la ruĝa stardo
kun la pola blanka aglo. *Tempora mutantur!*
... Kaj vere sufiĉe ŝanĝiĝis dum ĉi tiu unu jaro.
Kun sopiro atendis la poloj la alvenon de l' pola
regado kaj akceptis ĝin fine kun granda ĝojo;
des pli malĝajaj restis la germanoj, dispartigitaj
de sia patrujo. Sed ankaŭ en Polio oni ne lasis
seni al ili tro grandan severecon. Tamen, kiel
oni povis atendi, mullegaj germanoj formigris
Germanion. Restis ankoraŭ la nedecidaj kaj
malriĉeguloj.

La plej germana urbo de la iam prusa teri-
torio verŝajne estis Bromberg (Bydgoszcz). Tiu
ĉi urbo, la dua je grandeco en la provinco Pozeno,
kalkulis kun la plej proksima ĉirkaŭaĵo ĉirkaŭ
120000 loĝantojn, plej parte germanajn. Dum unu
jaro elmigris el la urbo pli ol 50000 germanoj.
Vere iom multe! Tio similas jam al popolmigro!
En la urbo mem ne multe ŝanĝiĝis. Ĉiuj oficejoj
kiel memkompreneble uzas kiel oficialan lingvon
la polan; sed ankaŭ la germana estas ĉiukaze
permesata. La komercistoj kaj vende-posedantoj
devis forigi la germanan surskribojn aŭ meti apud
la germana ankaŭ la polan. Ĉiuj stratoj ricevis
aliajn nomojn, parte tradukitajn sed plejparte novajn.
Antaŭ iu tempo pendis ankoraŭ ambaŭ ŝildoj, la
polaj kaj germanaj; sed nun ĉiuj germanaj estas
jam forigitaj, kaj je ajn oni ilin konservas kiel
dolĉa memoroĵo al germanaj tempoj. Jen la bildo
de la iam plej germana urbo.

Ĝoĝia fakto estas, ke ambaŭ nacioj, poloj kaj
germano, kvankam ne ĉie kaj ĉiam, tamen plej-
parte vivas en bona konsento. Ni esperu, ke la
bona interkonsento restu por ĉiam.

POLA ESPERANTO SERVO.

Dank-Esprimoj.

Antaŭ iu tempo mi publikigis alvokon en ET,
petante Esp. insignojn por la pola samideanaro.
Kun ĝojo mi nun komunikas, ke mi bone sukcesis,
kaj aĉenataĵ parto de ĉi tieaj samideanoj povis
ornami sin per nia bela insigno; la Esp. stelo.
Vere nia esperantismo estas bela; ĝi restu ĉiam
fia!

Je ĉi tiu loko mi esprimas en la nomo de la
Bydgoszcza German-Pola Esp. Asocio kaj kato-
lika grupo „Antaŭen kun Kredoj“ antaŭ ĉi tiu koran
dankon al s-ro Teo Jung, eldonanto de ET por la
afabla dispono de loko en la gazeto por nia
alvoko; plue al ĉiuj sendintoj, nome s-ro Butin,
Godesberg (Germ.); s-ro Kemme, Amsterdam
(Nederl.); s-ro Tarnow, Kiel; s-ro Lorenz, Koblenz;
s-ro Höber, Mannheim; s-ro Sieler, Gera; s-ro
Braschke, Breslau; ĉiuj Germanoj; s-ro Bonde,
Falun (Sved.); s-sino Mexin, Montreux (Svis.) kaj
s-ro Oppelt, Reichenberg (Bohemio). Ankoraŭfoje
sincere samideanan dankon.

Ĉiujn pluajn sendaĵojn bonvolu direkti al
Pola Esperanto Servo (P. E. S.)
A. Prengel, Bydgoszcz, Podgorze 17.

Recenzejo.

LIBROJ.

A MODERN MIRACLE „The Parliament of Man“ (Moderna
Miraklo: La Parlamento de l' Homaro). Bona propagand-
ilo kun ilustraĵoj de la kongresoj en la Kavalaria Salono-
n en Hago. Eldonita de Brita Esp. Asocio, Londono.

GAZETOJ.

AMERIKA ESPERANTISTO. Jan.
„Ne jam, sed baldaŭ“ estas la subskribo de artikolo,
kiu prikraktas la pri-Esperantan diskursen en la Ligo de
Nacioj. En la sama n-ro s-ro Scott komencas liston de
diplomaciaj esprimoj en la konvinko, ke ni bezonas plej
urĝe diplomatan vortaron, se la Ligo de Nacioj akceptu
nian lingvon. Ampleksa rubriko pri mondnovajoj de
Esperanto kun ekstraktoj el la tuta Esp. gazetaro.
L' ESPERANTO. Jan. (A. Paolet, San Vito al Tagliamento,
Italio.) Jarabono 10 liroj.

Komencas sian okan vivjaron en nova pli plac'a arango
kun kovrilo. Enhavas interalie tre interesan „gramatikon
de triula lingvo“ (1-a leciono). — Esperanta Sinonimo.
— Grafologio. — Itala Animo. — Revuo de la Revuoj, ktp.
ESPERO KATOLIKA. Febr.
La papo benis favore la laborojn preparajn por la Uni-
versala Kongreso de Tumuldoma Katolikaro (8-12. aŭg.,
1921 en Graz). — Interesa raportoj pri la unua kongreso
de katolikoj en Litovio.

Parolejo.

57.

Lasta Respondo pri „Lingvaj Respondoj“.
(Rilatas al 46, 50.)

„Por ke ne ankaŭ aliaj samideanoj komencu egalan laboron, ni atentigas niajn legantojn, ke s-ro Walter Lippmann prilaboris la Lingvain Respondojn de d-ro Zamenhof kaj baldaŭ publikigos tiun ĉi verkon (ĉe Germana Esp. Librojo, Leipzig).“

Ĉi tiu teksto (sub la titolo „Lingvaj Respondoj de d-ro Zamenhof“), kiun ni legis en ET kaj Esperanto (UEA), laŭ nia opinio nepe ne sufiĉe klarigas la intencion, sed erarkomprenebligas nin kaj certe ankaŭ aliajn samideanojn, nome, ke la verko estos esperantlingva, destinita por la tuta Esperantujo, iomete ŝanĝita reeldono de la jam aperinta „Lingvaj Respondoj“. Kiam poste la Germana Esperantisto informis pli klare pri tiu verko, ĉiam jam estis tro malfrue retiri nian artikolon. Ni nepe ne celis kaj-as personan atakon, ĉar veraj esperantistoj ne konas tian aferon. Male — ni deziras al la eldonanto ĉian sukceson kaj esperas, ke lia verko multe helpos al nia movado, kaj instruos kaj edukos la samideanojn je spertaj, letaj esperantistoj, kiuj bone scios nian lingvon, por ke ni ĉiuj flue kaj senenerge babilu en niaj kunvenoj, precipe ĉe niaj universitaj Esperanto-kongresoj.

Ĝis gaja revido en Praha!
(Fratoj Fejthke, Oppeln, Supra Silezio.)

58.

Pri Esp. Literaturo.

(Respondo al Fratoj Fejthke; komparu ET n-ro 15.)

Kun granda ĝojo mi trostudies vian interesan rezonadon koncerne la eldonadon de Esp. libroj kaj la Esp. literaturon ĝenerale. Certe vi estas pravaj kaj ankaŭ la plej granda parto de la samideanoj subtenas verŝajne vian opinion. Ni polaj samideanoj aniaŭ ĉio scias, kio estas aŭdi pri aperinta libro, studi la koncernenajn recenzojn, ĉiam neniam havi la ebelen کنم legi ilin. La ĉiam viglaj anglaj samideanoj je nia granda ĝojo ofte eldonas novajn belajn librojn. Lastatempe aperis la „Vivo de Zamenhof“ de Edm. Privat (3 ŝil.). La germanoj pagas por la libro 33 germ. mk., la poloj devus pagi laŭ hodiaŭa monkurzo pli multe ol 500 mk.; ĉu tio estas ebla? Oni do almenaŭ provizore eldonu la librojn ktp. en landoj kun malbona valuto! Per tia agado la eldonanto ne nur utilos al la tutmonda samideanaro, sed ankaŭ al si mem havigos materialan utilon.
(Fr. Pregel, Bydgoszcz, Polio.)

Fondo de Pola Esp. Servo (PES).

En preskaŭ ĉiuj nove kreitaj ŝtatoj ekzistas jam de longe diversaj Esp. servo. En Polio, la lando de nia majstro, kie la unua Esp. sono ek-aŭdiĝis, ĉio ŝajnas (kun kelkaj esceptoj) esti dormema. Post interkonsento kun ĉi tieaj malnovaj esperantistoj kaj eminentuloj de nia movado mi kuraĝas nun fondi la supre nomitan P.E.S.

Jen la celo de Pola Esp. Servo:

1. Plirapidigi la Esp. movadon en Polio.
2. Konatigi Polion eksterlande servante samtempe al la repacio de la popoloj (informejoj, gazet-servo).
3. Havigi esperantajn por la pola samideanaro.

Esp. Servoj, interrilatu kun ni!
Gesamideanoj, direkta viajn informetojn, demandojn ktp. al P.E.S. (por respondo aldonu pm. aŭ resp.-kup.).

Esp. gazetoj estas afable petataj represi ĉi tiun alvokon.

Ĉe la sama servo ricevebla tre bela ilustrita vidilo tra Bydgoszcz (1 resp.-kup.).

Pola Esperanto Servo (P.E.S.)
A. Pregel, Bydgoszcz, Podgorze 17.

Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per ŝtataj bankbiletoj, per ĉekoj je germanaj bankoj aŭ per resp.-kup. (15 por 10 n-roj). Ni liveros al negermanaj landoj por 20 gmk. 12 n-rojn de ET. Por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 hfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italiaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tiu ĉi prezo valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkanoj aŭ la Balkanalaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

- AŬSTRIO.
Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.
- BULGARIO.
Georgi Hr. Gaŝevski, Centra Librojo „Esperanto“, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
- ĈEĤOSLOVAKIO.
Otto Sklenčka, Hradec Kralovė.
Prof. J. Šlusser, Saaz 687.
- ESTONIO.
Helmi Drezen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo „Espero“, Rüttili t. 6, Tallinn.
- FINNLANDO.
O/V. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
- GERMANIO.
Postscheckkonto Köln 70863, Teo Jung, Horrem Bez. Köln.
- HUNGARIO.
Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt, Hajos-utca 15, II, 2.
- POLIO.
Adolfo Oberholtman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.
- PORTUGALIO.
Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da Assunçao 42, 5.



PIX AKTIEBOLAG



(Akcia Societo PIX, antaŭe Ericson & Robenius)

Fondita en 1897.

Telegrafa Adreso: PIX. Gevl.

Kodo uzata: A B C., 5-a eldono.

GEVLE, Svedio.

Fabrika por konfitaĵoj ĉiuspecaj, karameloj, bombonoj, altklasaj draĝeoj (sukermigdaloj), ĉokoladaĵoj, glicirizaĵoj kaj — speciale por eksporto —

Medicinaj pasteloj kaj Tabledoj.

Solaj fabrikantoj-eksportantoj de la bone konata medicina specialaĵo

„PIX“ ANTISEPSA GLICIRIZA PASTELO

kun agrablaj kaj refreŝiga gusto.



Rekomendata por ĉiutaga uzado al ĉiu, speciale al fumantoj, kantistoj, paroladistoj, militistoj, sportuloj ktp. Tutmonde akceptita de ĉiuj fumantoj kiel la plej bona rimedo por desinfekti la buŝon kaj gorĝon. — Grandkvante kaj konstante eksportata al diversaj landoj.

Aliaj specialaĵoj:

Higiena Bronka Tabledo „HERBA“, unuaklasa Mentola Bombono „EOR“.

Korespondado dezirata kun pograde aĉetantaj komercistoj en landoj, kie la fabriko ne ankoraŭ estas reprezentata.


Specialaj pakadoj kaj prospektaj estas laŭdeziro farotaj en ĉiu lingvo.

Postulu prezaron kaj senpagajn specimenojn!

Firmoj

kiuj havas intereson por germanaj komercaĵoj (egale de kia branĉo) kaj kiuj serĉas interrilaton kun germanaj firmoj, sin turnu al

Karl Purfürst, Plauen i. Vogtl.
Schliessfach 154.
Importo. Ĝeneral-Agentejo. Eksporto.



Janke & Kunkel,
Köln a Rh.
(Rejnlando, Germanio)
Fabriko de Kemikaj kaj Fizikaj Aparatoj estas liveranto de kemika, fizika kaj elektrika instruilaro kaj de kestoj por fari eksperimentojn. Nur seriozaj aĉetantoj petu antaŭkalkulon!

Brazilio!

Sinjoro J. BLOOMFIELD, komisisto, deziras reprezenti eksterlandajn firmojn.
Adreso: Strato Rosario, 152, I-a etaĝo, RIO DE JANEIRO, Brazilio.
Telegrafa adreso: TATU.

Marius Nielsen
Baumaterialien-Maschinen
Eilenburg bei Leipzig (Germ.)
rekomendas siajn maŝinojn por fabriki tegolojn kaj plataĵojn ĉiumaniere, same kiel fasonajn aŭ kavajn ŝtonojn el kalko kaj sablo.
Oni petu pli detalajn informojn.

Gesamideanoj!

Kiu scias ion pri s-ano Izso Brill, kiu estis persekuita de hungara registaro, tiu turnu sin al Hungara Esp. Societo Laborista, VII., Dohany-str. 71/l., Budapeŝt.

La societo dankeme akceptas ĉiujn scigojn pri s-ano J. Brill.

La Fabrikado de

Fratoj Stork kaj K-io Hengelo (O), Nederlando
konsistas en:
VAPORTURBINOJ, sistemo Zoelly, por ĉiu potenco.
VAPORKALDRONOJ, horizontalaj kaj vertikalaĵoj, de ĉiu grandeco kaj diversaj sistemoj, interalie Babcock-Wilcox akvotubo-kaldronoj por normala kaj tre alta vaporigo.
VAPORMAŜINOJ, horizontalaj kaj vertikalaĵoj, kun vapordivido per klapoj aŭ glicifermiloj, ĝis la plej grandaj ampleksoj kaj de diversaj sistemoj, i. a. kontinuuaj vapormaŝinoj de Stork-Stumpf.
TUBO-KONDUKILAROJ por elektraj centroj kaj fabrikejoj.
CENTRIFUGAJ PUMPILOJ por ĉia produkto kaj levalto, por senakvigo de poldroj, akvotubaroj, kaldronnutro, kondenso-aranĝoj ktp.
LEV-kaj TRANSPORTILOJ, i. a. irleviloj por elektraj centroj kaj fabrikejoj, karbotransportaranĝoj.
DIVERSAJ MAŜINOJ por SUKERFABRIKEJOJ kaj RAFINEJOJ.
RESERVEJOJ de ĉiu amplekso.
MOVIGILARO. FANDAJO. KRADOSTANGOJ.

Anoncetoj.

INFORM-PETO. S-ino Adele Sommer, el Semlin (Zimuny), Hungarujo. Mi petegas kaj kore dankos ĉian informon pri tiu samideanaro. Skribu al s-ro Paulino Santiago, del. UEA, Maccio-Alagoas, Brazilio.

MUZIKO. Al Mexin, Montreux (Svisio), 63, Grand' Rue, petas sendi al si Esp. kantojn kun muziko, solajn aŭ horajn, himnojn, romancojn ktp. Pagos aŭ interŝanĝos kontraŭ io alia.

ANGLA LINGVO. Anglaj gesamideanoj! Kiu volas al mi hejpe en la lernado de la lingvo, skribu al mi, Joezo Major, Budapeŝt IX, Remete str. 36-ll-4.

FOTOGRAF-ARTO. S-ro Otto Emmeri, Berlin-Friedenau, Odenwaldstr. 28, l., deziras interŝanĝi fotografajojn kaj leterojn pri fotograf-arto kun esperantistoj de ĉiuj landoj. Ĉiam tuj respondoj.

GRAMOFONOJ. S-ro J. T. Holmes, Roundwood Grange, Baildon, Shipley (Anglujo), deziras aĉeti gramofonajn diskojn surhavanajn Esp. kantojn, deklamojn k. s. Propozojn kun ĉiuj detaloj sendu al li.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:
Lisbono (Portugalujo). David de Carvalho, Rua das Olarias, 68 4-D-to, deziras korespondadon kun samideanoj ĉiulandaj kaj anarkiuloj aŭ personoj, kiuj interŝanĝas pri la socia movado.
Familio Max Hofmann, Chemnitz (Germ.). Nordstr. 5 Eg. deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kun ŝepa-fagej geadventistoj de ĉiuj landoj.
F-ino Judith David, Düsseldorf (Germ.). Bülker Allee 166, l. etg., deziras korespondadi kun ĉiuj landoj
Fritz Scharfberg, Düsseldorf (Germ.). Benzenbergstr. 22, deziras korespondi per belaj artaj poŝtkartoj, ankaŭ kolektas ĉiuspecajn Esp. teatrajn kaj koncert-programojn; ĉiam respondoj.
Kiu sendos al mi 25-50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da nuntempaj germanaj poŝtmarkoj. Karl Kueper, Düsseldorf 5 (Germ.), Graf Adolf Str. 11.
Korespondantojn mi deziras por kuraĝigi kaj instigi la kursanojn en oficiala kurso Londona. Robert Robertson, 564 Alexandra Park Road, London N. 22.
Varsovio, Polio, sir. Ziota 51, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tumondaj. Kiu sendos al mi diversajn poŝtmarkojn militajn, ricevos de mi rekompence diversajn uzutilajn kartojn ilustritajn.